§
# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 1 2022

## UGANDA KORTUMO NULIGIS LEĜON KONTRAŬ ALMOZPETANTOJ

Konstitucia Kortumo de Ugando ĵus deklaris, ke leĝo ekzistanta de koloniisma periodo en tiu lando, kiu malpermesas almozpetadon estas kontraŭ-konstitucia.

Tiu decido estis unuanime adoptita de la kvin membroj de la tribunalo. Tiu antikva leĝo, proklamita de la aŭtoritatuloj kiam Ugando estis brita kolonio, permesis al policanoj aresti homon vagadantan sen-cele tra strato aŭ publikaj lokoj, tiam ili povus esti konsiderataj kiel vagabondoj, trompuloj aŭ friponoj. Dum la koloniisma periodo, aŭtoritatuloj celis kunigi ĉiujn homojn ĉe difinitaj lokoj, tiel oni evitis eblajn tumultojn. Tio okazigis, ke almoz-petantoj ne povis troviĝi sur-strate, ĉar juĝisto povus kondamni ilin per mon-puno aŭ eĉ 6-monata enkarcerigo.

Tiuj, kiuj suferis ĉi tiun leĝon ĉefe estis almozpetantoj, prostituitinoj kaj var-vendistoj laborantaj sur-strate. Tiam se policano trovis iun el ili, oni povus konsideri lin kiel friponon aŭ



vagabondojn, do ili povus esti denuncitaj antaŭ juĝisto.

En Ugando prostituado estas kontraŭ-leĝa kaj se temas pri var-vendado, tio ne povas okazi ĉiu-loke, ĉar municipaj aŭtoritatuloj difinas kelkajn lokojn por merkati sur-strate. Do, ofte, policistoj ekigis vastaskalajn arestadojn kontraŭ prostituitinoj aŭ surstrataj var-vendistoj. Ili foje povus pagi al policanoj por eviti tiujn arestojn.

La kortumo decidis, ke kiu ajn leĝo, malebliganta la liberan trairadon de homoj sur stratoj aŭ publikaj lokoj ne povas esti akceptata.

# Vorto de la Semajno

## Bojkoti (tr):

Puni aŭ eldevigi iun (personon, klason, nacion) per sistema kolektiva rifuzo de sociaj aŭ komercaj rilatoj kun tiu. En ekonomia senco estas la interkonsentita rifuzo pri aĉeto for de la bojkotita persono, instituto aŭ nacio, pri importo aŭ negocado,

Sinonimo: *Blokadi.*

*La vorto bojkoto (bojkoti) derivas el la nomo de kapitano Charles Cunningham Boycott, senskrupula angla teromakleristo en Irlando, kiu suferis je organizita bojkoto de la Irlanda Ligo en 1880.*



En la jaro 1955, en la usona urbo Montgomery okazis protesto de nigra civilrajta movado kontraŭ la politiko de rasoapartigo. Dum la protestoj okazis bojkoto kontraŭ busoj, Ene de ĉi tiuj transportiloj, vojaĝanto devis sidiĝi sur malsimilaj lokoj laŭ sia haŭt-koloro.

### NOVA ESTRARO DE INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Okaze de la kunveno de IJEA, okazinta kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, la pasintan 9an de aŭgusto oni nomumis jenan novan estraron de nia asocio:

Prezidanto: José María Rodríguez, de Hispanio.

Sekretario: Querino Neto, de Brazilo.

Estraranoj: Miguel Faria de Bastos, de Portugalio.
Jimmy Stryhn Meyer, de Kanado.

Provizore la Prezidanto ankaŭ agados kiel kasisto.

Laŭ statuto de la asocio (art. 9), jena estraro oficas ĝis la fino de la Universala Kongreso de la jaro 2025.